

& Tro!:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 400 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per similaj melodio kaj rekantaĵo kiel por &"ABC-libro" kaj disduigo na strofoj. Klarigoj (*): '2 Preseraro por ĉu precipe, ĉu principe. '15 Tio estas insulto kompreneble nur laŭ ĉevala vidpunkto! (Rimarko de la aŭtoro).>

(#Melodio:

<1,6:23> (# Tre strömmingar:

/dodo MiFa ReFa MiMi DoMi SoSo; SoSo doTi redo dodo LaFa SoSo;

(#Rekantaĵe: So doTi dore do LaSo La a; FaFa MiFa SoFa ReTI Do o)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Kie estus fiakristo nekonanta ;
Kelkajn vortojn el la lingvo Esperanta?

(×:; **Per Esperanto venas kompren'** ;
Tondre paŝu en la ĉeno jen .)

'2 Se fremdulojn ekspluati li bezonas, ;
Ĉiulingve taŭgajn frazojn li jam konas!
.....

'3 Pelerino, fiakristo, eĉ perfekte ; Nian
lingvon ĉiam uzis sendifekte,

'4 Kaj pricipo*, ĉu sur strato, ĉu en
stalo, ; Esperanton li parolis al ĉevalo.
.....

'5 Kaj mirinde la ĉevalo lin komprenis,
; Kvankam ofte certa manko iom ĝenis,
.....

'6 Tio estas ĝenerale pri vortkodo ;
Instiganta la tirbeston al klopodo,

'7 Efektive ĉe ni mankas, kaj eĉ multaj,
; Sukaj vortoj, akre sakraj kaj insultaj!
.....

'8 Tion spertis, pli ol vir' kun bopatrino,
; Ĉiutage nia brava Pelerino... ..

'9 Iam ree lia besto ne nur ne tre ;
rapidetis sed eĉ haltis ĉiometre

'10 Kaj krom tio ĝi laŭŝajne, kvazaŭ
strike, ; Per la vosto manifestis plej
cinike!

'11 Pelerino kuraĝige kaj sukere ; jam
elĉerpis ĉiujn gamojn ĝiskolere,

'12 Jam li uzis, pli ordone, intermikse ;
Bruajn vortojn, aĉ-aldone, fi-prefikse!
.....

'13 Sed la besto des pli lame nur
zigzagis ; Kaj neniom, kaj neniel ĝi
reagis, -

'14 Pelerino aĉe kraĉe plue duŝis, ; Sed
eĉ vorto plej "fi-akra" ĝin ne tuŝis!

'15 Tiam peke, inspirete de l' satano, ;
Li ekkriis: "Hej, vi aka... demiano!"
(*).

'16 Kaj jen honte la ĉevalo tuj ekpalis ;
Kaj sub vipo de l' insulto ĝi mortfalis...
.....)